

Nikolaus Lenau,

La nokta vento

tradukita de Manfred Retzlaff

La nokta vento ĉesintas
Susuri tie ĉi,
La birdo ekripozintas
Kviete apud ni.

La fora, febla fonteto -
Ĉar mutas tie ĉi -
Aŭdeblas en la kvieto,
Flustranta estas ĝi.

Nun, kiam ĉio silentas,
Mallaŭta rememer'
Vekiĝas - tion mi sentas -
Plorante en la for'.²

Ke devas ĉio foriĝi,
Konata estas ĝi.
Aĥ, se nur povus mildiĝi
Anim-dolora ĉi!

*Traduko de la Germana poemo "Der Nachtwind" de NIKOLAUS LENAŬ (*1802-08.13 - †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982.*

MR-161-1 / Arg-674-1355 (2012-11-24 12:35:05)

²aŭ:

Revenas la memoro
Mallaŭta kun sonor'
El la profunda koro
ploranta en la for'.